

TREVOR STEELE

LA FOTOALBUMO FERMIĜAS



FEL

Senpaga provlibro!

La fotoalbumo fermiĝas

***Eldono de Flandra
Esperanto-Ligo***

n-ro 40 en la serio „Stafeto”



Tiu ĉi bitlibro enhavas nur parton de la verko. Ĝi rajtas esti libere kopiata.

***La fotoalbumo
fermiĝas***

***Apendico al „La
fotoalbumo” volumoj
1 kaj 2***

Trevor Steele

Karaj legantoj,

Ke vi povu apreci tiun ĉi volumeton, preskaŭ necesas, ke vi legu la du volumojn de *La fotoalbumo*. Sed nun la stilo de tiu ĉi serio draste ŝanĝiĝos. Unue mi prezentu min: mia nomo estas Michael O'Shea, kaj mi estas la sola filo de profesorino Zoe O'Shea. Pri mia estiĝo mi iom skribos poste.

Mi tuj aldonu, ke la du antaŭaj volumoj kun la titolo *La fotoalbumo* ne estis verkitaj de mi. Ke mi entute aldonas al tiuj rakontoj fontas el promeso, kiun mi faris al mia mortanta patrino, kaj eĉ tiam mi prokrastis dum kelkaj jaroj.

Mi skribas nun, ĉar mia tempo estas limigita. La unua specialisto diris, ke mi vivos eble ankoraŭ unu jaron. Mi insistis pri dua opinio, kaj ricevis ĝin: la dua kancerologo „donis” al mi ses monatojn. Nevideblaj meĥanismoj interne de mia korpo nehaltigeble

detruas mian sangon kaj formanĝas
mian vivon, kaj nun mi eĉ iom sentas la
malfortiĝon de mia instinkto kroĉiĝi al
tiu ĉi vivo. Ŝajnas, ke nun miaj ambicioj
limiĝis al unu: fini tiun ĉi kronikon, antaŭ
ol mia interna horloĝo ĉesos funkcii.

ΛΛΛΛΛ

Mi kredas, ke iam Goethe diris, ke li ne
volas okupiĝi pri la historio: ĝi estas
senĉesa serio da mortoj. „Kadavrejo”
estis, mi kredas, lia esprimo.

Morto certe rolas en la estiĝo de tiu ĉi
fina kaj la du aliaj volumoj. Morto venis
al la mondo amasnombre en la
malbonaŭgura jaro 1939, kiam la
familia rakonto de *La fotoalbumo*
komenciĝis. En la analoj de la familio
diversaj mortoj – tiuj de Matt, de Rita,

de Bernie – estas prezentitaj, sed sekvis multaj aliaj vivofinoj.

Mia patrino Zoe eldonis la unuajn volumojn, sed ŝi ne verkis ilin. Ŝi ricevis ilin kvazaŭ herede kaj promesis eldoni, se io okazos al la aŭtorino. Kaj Zoe promesis iam daŭrigi la rakonton: kial ŝi ne povis tion fari, vi facile komprenos, kiam vi legos pri ŝia vivo. Kiam mia patrino sciis, ke ŝi ne plu havas la forton por plenumi sian promeson, ŝi siavice ricevis de mi promeson, kiun mi nun volas plenumi.

Ĝisfine mia patrino konservis sian senson por humuro. Ŝi rifuzis rekte riveli al mi, kiu verkis la unuajn volumojn. Ŝi petis min relegi kaj diveni. Mi simple ne povis decidi. Mia unua divenprovo estis: *ĉu vere estis familiano?* La respondo estis, ke jes. Mia cerbumado ne atingis ian klarecon. Do Panjo demandis, kiu laŭ mi estus la plej malprobabla kandidato: Paddy? Diana? Sean? Bridget?

La respondo estis unue simple nekredebla: la aŭtorino estis Diana, mia avino. Sed Diana estas daŭre prezentata sur la paĝoj kiel homo mense tre limigita, nekapabla pensi por si, tute dependa de sia eklezio por respondoj al la misteroj de la vivo. Kaj krome Diana estis dum pluraj jaroj alkoholulino, kaj ŝia malforto tiurilate estas senkompate priskribata.

Mia patrino klarigis al mi, ke ege surprizis ŝin, kiam Diana transdonis al ŝi la manuskripton. Sed kiam ŝi konvinkiĝis, ke la patrino vere skribis tiujn paĝojn, kiuj ja donas sufiĉe negativan bildon pri la aŭtorino, Zoe iomete esploris la familian fonon de Diana. Pri sia patro, Matt Eastley,- Diana skribis malmulton, sed donis interesan detalon: *Matt emis oratori publike*. Mia patrino malkovris, ke Matt Eastly fakte estis konata kaj tre ŝatata publika oratoro kaj rakontanto, kaj ofte kontribuis amuzajn artikoletojn al la ĵurnalo *Cairns Post*.

Do la talento de la patro kuŝis latente en Diana dum jardekoj. Malfrue en la vivo ŝi malkovris la propran verkkapablon, kaj laŭ mi ŝi bone sukcesis en la arto kaŝi arton. Kiu imagus, ke la senkolora, submetiĝema, malforta virino fakte skribas pri si tiel negative, kaj povas akre observi la fortojn kaj mankojn de ĉiuj aliaj? Kaj ŝi lerte misgvidis pri sia identeco.

Tamen Diana ne volis, ke la verko aperu antaŭ ŝia morto. Ŝi sciis, ke kelkaj el ŝiaj idoj tre ofendiĝos. Sed ŝi kredis, ke la prezentaĵo estas honesta. Ankaŭ Zoe ne volis instigi gefratojn verŝi sakraĵojn sur ŝian kapon. Nenie ŝia nomo aperas; ŝi elpensis iun pseŭdonimon, „Trevor Steele”. Tiu fikcia homo estu la pafcelo de Sean, Bridget, Vanessa, kaj eble aliaj.

ΛΛΛΛΛ

Kiam mi konis la sekreton pri la aŭtorino, mia patrino diris al mi, ke

retrospekte ŝi devintus diveni, ke Diana faras „ion nekutiman” post la morto de Paddy. Ŝi funebris dum pluraj monatoj, sed tiam ŝi uzis sian monon, al kiu aldoniĝis la asekursumo, kiun Paddy ĝismorte pagis, por aĉeti dometon ĉe la marbordo (ŝi ofte plendis pri la troa malvarmo de Aglo-Nesto) kaj dediĉis sin al iu mistera tasko, kiun ŝi volis prisekreti de la gefiloj. Ŝia masko estis senfina serio da krucvortenigmaj kajeroj tre videblaj, kiam iu vizitis. Sed samtempe Diana petis ĉiujn familianojn sendi al ŝi fotojn kaj leterojn, kiuj iel rilatas al la familia historio. Diana svage parolis pri „fotoalbumo”, kiun ŝi celas kunmeti. La gefiloj supozis, ke temas pri serio da fotoj, kaj volonte plenumis ŝiajn petojn. Neniu divenis, pri kia „fotoalbumo” temas.

Eblas diri, ke verkado de la du volumoj estis speco de dua vivo por Diana. Ŝia amo al Paddy neniam ĉesis, sed ŝi trovis, ke ŝi estas pli ol nura edzino de

Paddy O'Shea, ke ŝi havas ian propran talenton.

Kiam Diana sciis, sep jarojn post la morto de Paddy, ke ŝia morto venos baldaŭ, ŝi elektis Zoe kiel konfidenculinon.

ΛΛΛΛΛ

Tiu ĉi modesta volumo ne daŭrigos la sistemon de la du fruaj. Unue pro tio, ke mi ne disponas pri la centoj da bildoj, el kiuj Diana povis elekti por illustri sian verkon, kaj mi ne havas simile grandan nombron da citeblaj leteroj (nuntempe oni ĉiam pli malofte skribas leterojn). Due, mi devas provi daŭrigi la rakonton ĝis hodiaŭ, kaj la dua volumo finiĝis en la jaro de la morto de Bernie en Vjetnamio, en 1970. Kiel mi prezentu preskaŭ 50 jarojn en unu maldika libreto, kiam Diana bezonis centojn da paĝoj por prezenti 30 jarojn?

Alia problemo, kiun Diana miaopinie sufiĉe sukcese alfrontis, estis tia ĉi: pri kiuj temu la rakonto? Nur pri Paddy, Diana, kaj iliaj gefiloj? Aŭ pri la bofamilioj kaj la idoj de la idoj? Kie familio komenciĝas kaj kie ĝi finiĝas? Nu jes, ni estas ĉiuj posteuloj de Adamo kaj Eva, niaj mitaj pragepatroj, sed ie devas esti limo de libro! Do mi decidis apenaŭ trakti la vivon de mia generacio, Martin, Austin, Gloria, Norman, Henry, Tobias, Stephanie, kaj Sharon (pri Rita, la misforma bebo de Vanessa, mi povas simple raporti, ke ŝi mortis nur trijara). Aĥ, estos unu escepto.

Jes, la temo devas esti relative limigita, ankaŭ pro tio, ke mia komputila laboro konkuras kun la „progreso” de mia kancero. Mi provos ne plu mencii tion.

La morto de Bernie en Vjetnamio nepre devis havi sekvojn. Kiam Paddy eksciis pri la morto de tiu amata filo, la estonta aŭstralia rugbiostelulo, li ŝajnis mem

ŝrumpi. Ĉe ĉiu morto de plej favorata filo aŭ filino Paddy povis nur sangi interne kaj demandi, „Aj kial? Kial Matt? Kial Rita? Kial nun Bernie?” Kion la familianoj ne sciis, estis ke Paddy mem havas korproblemon, eble rezulte de la preskaŭ mortiga akcidento en la segejo antaŭ kelkaj jaroj. Neniu suspektis, ke la ŝoko pri la morto de Bernie katalizos krevon de korvalvo. Lun vendredon Paddy plendis pri granda laceco (estis multe da laboro en la butiko tiun tagon). Sabaton matene, je la hororo de Diana, Paddy ne vekigis.

La tuta familio kaj ges-roj Freeman ariĝis en Aglo-Nesto por la entombigo de Paddy. Estis kortuŝa momento, kiam oni mallevis la ĉerkon en la truon. Diana, kiu antaŭe ŝajnis en stuporo kaj montris nenian emocion dum la preĝeja ceremonio (Sean aranĝis, ke la nekatoliko Paddy tamen estu adiaŭita en la preĝejo de Sankta Tereza), estis probable konvinkita, ke la sola viro, kiun ŝi iam ajn amis, devas eniri la

Inferon. Dum la ĉerko malrapide sinkis teren, ŝi subite ekviglis – se Paddy eniros la Inferon, ŝi iros kun li. Ŝia amo venkis ŝian religian timon. Ŝi provis kuŝigi sin sur la ĉerkon kaj malaperi el la mondo kune kun li. David kaj Sean devis interveni kaj fortiri la patrinon.

ΛΛΛΛΛ

Post la enterigo la familianoj iris al la domo de Diana. Oni funebris ne nur pri Paddy sed ankaŭ pri Bernie, kies kadavro kuŝis ie en Vjetnamio. Zoe estis nervoza; ŝi timis, ke povos esti emocia eksplodo pri la morto de la universale amata frato. Kaj ŝi pravis. Estis forta disdivido: Sean kaj Bridget kaj Joe kaj Julia unuflanke, David kaj Zoe aliflanke; Tommy, Vanessa, Diana kaj Helga restis konfuzitaj kaj neŭtralaj.

Sean asertis, ke necesas honori la morton de Bernie kiel heroan oferon por la lando Aŭstralio kaj la afero de demokratio. David ne povis silenti: lia

pravorto en tiaj situacioj, „Bovosterko!” eskapis el lia buŝo. Bernie, li diris, estis senkulpa viktimo de monstra politiko de la monda imperiismo de Usono kaj la salivleka poltroneco de la aŭstralia registaro. Laŭta ĥoro de protestoj el diversaj buŝoj nur instigis David krii, ke estas tragedio, ke lia amata frato mortis pro tia senhonora kaj krima afero. Zoe levis la brakojn kaj volis iel intermeti sin inter la du „tendarojn”.

Subite la bebo Austin en la brakoj de Bridget, timigite de la ekscitiĝo de sia patrino, donis laŭtan bebokrion, kaj Martin, kiu eble timis, ke oni venos ataki lian patron David, same laŭte kriis.

La „interveno” de la du etuloj dummomente silentigis la plenkreskulojn, kaj Zoe mallevis la brakojn kaj diris kun voĉo, kies aŭtoritato surprizis ĉiujn, ankaŭ ŝin, „Bonvolu, ni ne povas revivigi Paĉjon aŭ Bernie! Bonvolu memori, ke

malpaco inter ni atingos nur malbonon. Bonvolu, ĉiuj! Ni scias, kion ni mem pensas, ni scias, kion la aliaj pensas – senutile ĵeti vortojn al aliaj!” Ŝi turnis sin rekte al David. „Daĉjo, vi scias, ke mi samopinias kiel vi, kaj vi scias, ke mi amas vin, sed mi petegas vin ne uzi vortojn, kiuj ofendas la aliajn! Bonvolu, Daĉjo!”

Austin kaj Martin apenaŭ plu aŭdeblis.

„Bone dirite, Zoe!” Sean diris. „David ĉiam emis uzi ofendajn vortojn!”

„Sean, David estas kuraĝa homo kun fortaj konvinkiĝoj. Se foje li troigas, sciu, ke liaj intencoj estas bonaj. Mi petegas vin ĉiujn aŭskulti la bebojn, kiuj protestas kontraŭ milito en la familio mem. Mi proponas, ke ni ĉiuj promenu laŭ la strato dum kvin minutoj kaj rigardu la belan panoramon de la montoj, kaj lasu malantaŭ ni ĉian koleron.”

La homoj rigardis sin ĉue, kaj David ekmoviĝis, „Bona ideo, Zonjo. Venu, ni ĉiuj iom promenu. Kaj ni babilu pace. Sean, mi iros kun vi. Ni parolu pri via laboro kaj mia.”

Post la foriro de la ceteraj David restis kun sia patrino. Li jam aranĝis forpermeson de sia lernejo, kaj fratino Tereza, la estrino, estis tre komprenema. Li rajtis resti for dum tuta jarkvarono, kaj lia posteno estos sekura.

Kaj Diana vere bezonis lian helpon. La laboro en la butiko, kiu postulis ŝian atenton, helpis, ke ŝi iom post iom eliru el sia „zombia stato”. Helpis ankaŭ, ke vespere David paroligis ŝin pri sia propra vivo eĉ antaŭ la konatiĝo kun Paddy. Li volis, ke ŝi komprenu, ke ŝia ekzisto ne tute dependas de la ĉeesto de Paddy, ke ŝi povas havi sendependan vivon.

Aldonendas, ke Diana kaj David ofte parolis telefone kun Zoe. Mia patrino jam estis agnoskata kiel saĝa homo malgraŭ tio, ke ŝi estis nur dudekunujara. David iam diris al mi multajn jarojn poste, ke ofte venis propono de Zoe, kiu vere helpis.

La „terapio” sukcesis. Dum pli ol du monatoj Diana estis en funebra humoro, sed iom post iom ŝi parolis pli kaj pli pri siaj gepatroj, aparte pri sia patro. Neniu suspektis tiutempe, ke venis al Diana la deziro fari ion, kion ŝia patro lerte faris: registri la eventojn de la familia vivo.

Kelkajn monatojn poste, kiam Diana, kun la helpo de David, sukcesis vendi la domon kaj la butikon kaj aĉeti dometon en la marborda vilaĝo Mourilyan, David reiris al sia lernejo en Monto Stevens en Brisbano. Ŝajnis dume, ke la malnova kunvivado de David, Helga, Martin, kaj Zoe daŭros.

I un tagon estis frapo ĉe la pordo de ilia apartamento. Zoe iris al la pordo, kaj vidis antaŭ si belan sed solen-vizaĝan viron eble dudektrijaran.

„Ĉu vi estas Zoe O’Shea?” la viro iom heziteme demandis.

„Jes. Kaj vi?”

„Mia nomo estas John Towers. Zoe, mi havas ion por vi. De via frato Bernie.”

„Ĉu?” Zoe, mi certas, estis tre surprizita. „Bonvolu eniri.”

John prezentis sin kiel iaman soldaton en Vjetnamio, kie li amikiĝis kun Bernie. „Ni ĉiuj amis Bernie, kaj lia morto trafis nin ĉiujn. En milito vi ne povas tro longe funebri pri iu mortinto, ĉar morgaŭ estos alia. Sed mi neniam povis forgesi Bernie. Eble li intuciis, ke li ne revenos vivanta al Aŭstralio. I un tagon li montris tion ĉi al mi kaj eltiris el mi promeson.”

John transdonis al Zoe volvitan kartonon. „Bonvolu malvolvi ĝin, Zoe.”

Zoe faris tion kaj vidis pentraĵon de vjetnama kamparulo, kiu rikoltas rizon. La verko estis lerta kaj tuj plaĉis al ŝi.

„Bernie amis tiun pentraĵon kaj aĉetis ĝin en Sajgono dum semajno da forpermeso. Li diris, ke bonaj vibradoj eliras el ĝi.”

„Tipa diro de Bernie! Ĝi vere plaĉas. Dankon, John.” „Bernie diris al mi, ke se io okazos al li kaj li ne povos transdoni tion ĉi al vi, ke mi faru lialoke.”

Subite larmoj elfluis el la okuloj de mia patrino. Ŝi devis longe lukti por ne singulti. „Se mi ne povas havi Bernie ĉe mi, mi tamen kontentas havi ion, kion li destinis por mi. Refoje dankon, John.”

„Bernie ofte rakontis pri sia ‘dua patrino’. Laŭ li vi estas la plej bona kaj

saĝa homo en la tuta mondo.”

„Ho Bernie – kia perdo! Bernie estis absolute aminda homo, bonkora kaj iom naiva en tre ĉarma maniero.”

John vidis ŝancon iomete pligajigi la situacion. „Naiva jes, aminda jes. Kaj tiel senkulpa homo! Aŭskultu, Zoe. Dum tiu semajno en Sajgono multaj el ni decidis iri al bordelo. Ili pululas en Sajgono. Ni informis Bernie kaj invitis lin iri kun ni. Ĉu vi povas imagi, kiel li respondis?”

„Li estis absoluta ĝentlemano kun virinoj, sed mi ne povas diveni, kiel li esprimis tion.”

„Li diris: ‘Ne, mi ne konas la virinojn.’ Ĉiuj ridegis, kaj ni iris pluen sen Bernie.”

John kaj Zoe parolis dum horoj pri sia komuna temo. Evidente John sincere amis la grandkorpan amikon. Zoe

alternis inter plorado kaj ridado, kaj ofte rigardis la pentraĵon, kiun ŝi nepre volis pendigi en sia ĉambro.

Kiam David venis hejmen, kaj poste Helga kun Martin, kiu evidente ĝuis sian tagon en la infanvartejo, Zoe proponis, ke ili invitu John vespermanĝi kun ili. Ĉiuj konsentis, kaj John volonte akceptis.

Post la manĝo kaj David kaj Helga devis kontroli hejmtaskojn de lernantoj. David tamen insistis unue ludi kun Martin, ĝis la knabo estos dormema.

Dume John kaj Zoe daŭre konversaciis, kaj nun ne plu nur pri Bernie. Zoe volis scii pli pri la tempo de John en Vjetnamio. Li ne volonte rakontis, dirante, „Zoe, Vjetnamio tordis mian cerbon. Mi ne scias, kiel mi kutimiĝos al normala vivo post la multaj traŭmatoj. Mi mortpafis homojn tie. Kaj vidis amikojn mortaĉi.”

„Pardonu, John, mi ne rajtis demandi pri tio.”

„Sed eble estus bone, se mi tamen rakontus al vi. Mi jam vidis, ke Bernie pravis: vi estas elstare prudenta homo.”

Zoe nekarakterize hezitis respondi. Ironiaĵo ne tuj saltis de ŝia lango. Sed ion ŝi sciis: ke tiu bela viro altiras ŝin, kaj se ŝi povos helpi lin venki siajn traŭmatojn, ŝi tre volonte faros tion.

„John, kie vi loĝas en Brisbano?”

„Mi ne loĝas ĉi tie, fakte mi loĝas nenie. Mi venis rekte el Sidnejo ĉi tien por transdoni al vi la pentraĵon.”

„Do ... ne mia afero ... sed kie vi tranoktos?” „Eble mi devus reiri al Sidnejo trajne. Sed miaj rilatoj kun mia patro estas malbonaj. Panjo mortis antaŭ kelkaj jaroj. Mi eĉ ne informis Paĉjon, ke mi revenis al Aŭstralio. Sendube li estas ebria ie.”

„Veturi noktomeze al Sidnejo? Kaj sen scii kien? Freneze, John. Vidu, estas neokupita ĉambro en tiu ĉi apartamento. Mi proponos al la aliaj, ke vi dormu tie ĉi-nokte.” Subite John sentis sin laca kaj preta akcepti la gastamon. Li mem ne sciis antaŭe, kion li faros – eble serĉi tre malmultekostan hotelon. „Mi ne volas ĝeni, Zoe ...”

„Sensencaĵo, estas plezuro gastigi vin. Momenton, mi parolos kun David kaj Helga.”

Post kelkaj minutoj ŝi revenis al John kun kapkuseno kaj litotukoj kaj kovrilo.

John pasigis la nokton en Grange Park, kaj la postan tagon li ne sciis kion fari. Ĉu li serĉu laboron? Sed kiel li faru rutinan laboron post du jaroj da timoplena rampado tra vjetnamaj ĝangaloj, kie ĉiu momento povus esti la lasta de la vivo? Kaj bildoj de homoj,

kiujn li mem mortigis, svarmis en lia kapo.

Estis klare, ke li devos foriri de la apartamento, sed kortuŝis lin, ke Zoe lastamine donis al li la telefonnumeron. „John, se vi volos viziti min – nin, ne hezitu.” Ŝi ridis iom knabinece, „Vi ne lasis min skribi eĉ unu vorton de mia tezo hieraŭ, sed mi ne bedaŭras.”

„Zoe, mi ne scias kion diri. Via gastamo estas pli, ol mi meritas.”

„Bovosterko! Kiel David ofte diras, se li ne konsentas pri io.”

La postan semajnon David observis Zoe kaj diris iun vesperon, „Zoe, vi refoje renkontis John en la urbo, ĉu ne? Mi neniam vidis vin neglekti viajn studojn tiumaniere. Ĉu vi scias, kion vi celas kun li?”

„Mi ne bone scias, Daĉjo. Mi scias, ke li havas kelkajn problemojn, sed eble mi povas lin helpi.”

„Helpi lin? Aŭ admiri lian belan vizaĝon ...?”

„Jes, li estas bela sed iom, fakte tre, afliktata. Kaj iom doloras al mi, ke li tranoktas en domaĉoj, kie li devas eliri ĉiumatene post minimuma manĝeto. Sciu, ke antaŭ ol li soldatiĝis li intencis studi juron. Sed li diris, ke la mondo de juristoj ŝajnas tute nereala al li nun. Kaj li havas nenian familian vivon en Sidnejo.”

„Ĉu li ne serĉas laboron?”

„Li diris, ke jes, sed evidente ne plenkore.”

„Zonjo, vi foje klaŭnumas pri via deziro esti forkaptita de iu diklipa viro. Ĉu vi enamiĝis al John?”

Zoe longe rigardis la plankon. Ŝi ofte cerbumis, kion tiu desegnaĵo sur la tapiŝo simbolas. „Eble. Mi ne komprenas min mem. Ĉu mi nur volas helpi homon en mizera stato – aŭ ĉu mi volas multe pli? Daĉjo, iom alarme estas, ke mia studado, kiu kutime vere ravas min, ŝajnas malpli interesa post la alveno de John.”

„Mi observis tion. Nu, franjo, mi volas nur, ke vi estu feliĉa.”

„Kaj David, se mi rajtas ŝanĝi la temon. Ĉu vi estas feliĉa? Vi ne elradias grandan kontenton. Se Martin ne estus ĉi tie, ĉu vi restus?”

„Mia respondo similas vian: mi ne scias.”

Ankoraŭ unu monaton poste David atendis, ĝis li povis paroli kun Zoe

duope. „Zonjo, ĉu vi konscias, ke vi neglektas vian tezon?”

„Jes. Sed mi ne scias kion fari. John ...”

„Jes, John. Ĉu li ankoraŭ ne trovis laboron? Ĉu li vivas de la kafo kaj kuko, kiujn vi donacas al li?”

„Li ricevas matenmanĝon ĉe la Savarmeo. Kaj foje vespermanĝon.”

„Li estas juna, bela viro, kiu almenaŭ aspektas sana. Ĉu vi kredas, ke li vere serĉas laboron?”

„Ŝajnas, ke ne. Sed Daĉjo, vi ne povas kompreni la hororojn, kiujn li travivis en Vjetnamio. Foje li rakontas, eĉ ploras, kaj estas evidente, ke li estas ankoraŭ turmentata.”

„Ĉu ne estas helpo por tiaj ekssoldatoj?”

„Eble jes, sed li ne volas meti sin en la manojn de ‘kap-ŝrumpigistoj’, kiel li

nomas psiĥologojn. Li diris, ke li aŭskultus ilin nur, se ili mem spertintus militon kaj scias, kiel estas mortigi alian homon.”

„Zonjo, vi ne invitis lin ĉi tien. Ĉu vi timas, ke ni – Helga kaj mi – havus negativan opinion pri li?”

Zoe rigardis refoje tiun enigman desegnaĵon sur la salona tapiŝo. „Mi ne volas konfesi tion, sed jes ... vi pravas.”

„Sed vi renkontas lin tre ofte – kaj neglektas vian tezon. Ĉu vi scias, kien la afero povas iri?”

„Daĉjo, vi diras, kion mi daŭre pensas. Pravas, ke mi enamiĝis al John, kaj ŝajnas, ke li tre ŝatas min. Li volas inviti min pasigi semajnfinojn kun li ĉe la marbordo.”

„Ĉu vi volas iri kun li?”

„Jes. Sed mi timas, kio povus okazi.”

„Zonjo, al mi ŝajnas tute klare, kio povus okazi. Kaj mi ne volas, ke mia kara fratino estu vundita. Diru, se vi jam diskutis la inviton, kiu pagus la loĝadon?”

„Ni ne diskutis tion, sed mi supozas ... ke mi.”

„De via giganta stipendio? Mia kara, se li ne povas eĉ kontribui, kia partnero li povus esti?”

„David, vi juĝas lin tre negative. Li havas bonajn karakterizaĵojn.”

„Zonjo, mi kompromisos. Mi volas, ke vi estu feliĉa. Evidente vi volas iri kun li al la marbordo. Mi sekrete helpos finance. Mia deziro estas, ke vi sciu, ĉu tiu rilato kun John estas daŭriginda.”

Zoe longe pripensis. Fine ŝi akceptis.

Kaj tiel okazis. Do mi koncipiĝis en Southport, apud la grandioza Pacifika Oceano.

Zoe ne informis John dum du monatoj, ke ŝi estas graveda. La reago, kiun ŝi timis, realiĝis. John subite panikiĝis – esti patro estis tro por li. Sen averti mian patrinon, li malaperis iun tagon, kiam mi gastis en mia patrino la trian monaton.

Zoe devis decidi. La malapero de John preskaŭ rompis ŝian koron, sed baldaŭ ŝi diris al si, ke li ja estus senespera patro. Do ĉu ŝi abortigu la bebon, aŭ provu iel trabatali kiel studentino kaj patrino?

La respondo estas, ke mi nun skribas tiujn ĉi paĝojn.

Pri mia patro mi eĉ ne havas foton. Mi ne scias, ĉu bedaŭri tion aŭ ne. Nur pri

tiu temo mia elokventa patrino ne
volonte parolis.

Je mia dispono estas tre malmultaj leteroj. Sed tiun ĉi mi tamen uzu.

Kara Helga,

Sendube ankaŭ vi jam delonge scias, ke nia kunvivado ne vere feliĉigas nin. Sed ne kulpigu vin: se estas kulpo, do miaflanke. Sed prefere mi dirus, ke ni ambaŭ troviĝas en situacio, kiun ni ne antaŭvidis, kiam ni decidis geedziĝi. Pardonu la esprimon, sed mi sentas min kvazaŭ en kaptilo; kaj mi kredas, ke ankaŭ por vi la situacio estas nedaŭrigebla.

Sciu, ke mi ne forlasas vin por vivi kun alia virino – mi esperas, ke tio estas ioma konsolo. Ne, mi ankoraŭ ŝatas vin kaj aprecas vian sindediĉan karakteron, kaj mi ege dankas pro la multaj

komplezoj, kiujn vi faris al mi ekde nia renkontiĝo en Kamara.

Vi de tempo al tempo menciis Gary, la instruiston de la paralela klaso en via lernejo. Kaj mi kredis subaŭdi ian korinklinon al li. Nu, mi vizitis lin en lia apartamento. Unue li kredis, ke mi venas bati lin pro flirtado kun mia edzino. Sed mi rapide trankviligis lin. Mi pridemandis lin kaj konstatis, ke li fakte estas simpatia ulo kaj ke li vere ŝatas vin kaj trovas vin altira. Lin ne interesas politiko, sed jes ĝardenumado – do li estus pli bona partnero por vi ol mi povas esti. Do se vi volas esplori intimajn rilatojn kun Gary, mi tute aprobas. Fakte mi volas, ke vi havu bonan koramikon kaj ne estu soleca.

Por mi la dolora afero estas, ke mi planas foriri kaj lasi Martin ĉe vi. Vi scias, kiel forte mi amas nian knabeton, kaj mi esperas, ke ni povas resti en amikaj rilatoj kaj ke, kiam mi revenos,

mi havos oftan aliron al Martin. Mi ne volas tuj divorci, sed la decido estu via.

Cetere, se devos esti divorco, eble estus bona ideo atendi. La Laborista Partio intencas, se elektita, plihumanigi la leĝojn kaj enkonduki „senakuzan” divorcon – ne plu necesos, ke unu el la partneroj „pruvu” misagon de la alia.

Henjo, pri mono: dum miaj jaroj da instruado mi sukcesis, kiel vi scias, ŝpari kelkajn dekmilojn. Mi intencas doni al vi duonon de tiu sumo; tio estu helpo por pagi la luon de la apartamento, la elspezojn por Martin kaj por Zoe. Vi scias, ke Zoe amas nin ambaŭ kaj servos kiel ponto inter ni. Kaj baldaŭ ŝi mem naskos kaj bezonos financan helpon.

Mi vojaĝos tre baldaŭ al Germanio. Mi ricevis postenon de asista instruisto en Münster, la ĉefurbo de la provinco Vestfalio. La enspezoj ebligos vivtenadon, sed certe ne riĉigos min.

Kiam mi havos fiksan adreson tie, mi skribos al vi. Eble necesos kontakti min. Cetere, la VW mi transdonas al vi. Vi devos nur subskribi la dokumentojn, kiam ili alvenos poŝte.

Kara Henjo, tiu ĉi letero eble donos al vi ŝokon, sed mi esperas, ke baldaŭ ankaŭ vi spiros pli libere sen la edzo, kiu ne kontentigis vin.

Mi donu al vi lastan surpaperan kison.

David.

Tiun ĉi leteron Zoe transdonis al Helga post vizito ŝia al la familianoj en Ipswich. Evidente la movo estis bone planita: liaj vestoŝrankoj estis preskaŭ malplenaj kaj liaj libroj estis for. Taksio venigis lin al la lernejo en Monto Stevens. Fratino Tereza permesis, ke li „provizore” uzu malplenan ĉambreton por staki siajn librojn. Li luis

apartamenton en trietaĝa domo en la antaŭurbo Bardon.

Laŭ mia patrino Helga ploretis dum kelkaj tagoj, sed baldaŭ sentis sin libera. Sed la eventuala amafero kun Gary, post ŝajne promesoplena komenco, ne longe daŭris. Tion kaŭzis grandparte la tre negativa reago de Martin – sed pri tio mi devas raporti poste. Helga restis senedza dum la cetera vivo.

Kaj mia patrino, post mia naskiĝo, transloĝiĝis al Toowong, kie amikino ŝia, iama kunstudentino Beverley, tre bone prizorgis min, dum Panjo laboris pri sia tezo aŭ ĉeestis prelegojn. Beverley estis iom riĉa heredintino kaj povis vivi sen labori, kaj mia patrino pagis nur tre modestan lupagon, sed promesis pagi normalan luon, kiam ŝi mem normale enspezos. Kaj kompreneble ŝi faris tion.

Post la foriro de John ŝia laborritmo estis, Beverley diris iam al mi, preskaŭ timige rapida; ŝi voris libron post libro kaj faris ampleksajn noticojn.

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi nekompleta provlibro. La tuta libro estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be, mendoj@fel.esperanto.be

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi nekompleta provlibro. La tuta libro estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be, mendoj@fel.esperanto.be

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi nekompleta provlibro. La tuta libro estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be, mendoj@fel.esperanto.be

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en tiu ĉi nekompleta provlibro. La tuta libro estas aĉetebla ĉe www.retbutiko.be, mendoj@fel.esperanto.be

Kolofono

Titolo: La fotoalbumo fermiĝas

Aŭtoro: Trevor Steele

Serio: Stafeto n-ro 40

Kovrilo: Ferriol Macip

ISBN de la papera eldono: 978 9077

066 59 1

UDK: 82.3.892

NUR: 300

IBAN: 17-11-304-392

Leĝa depono de la papera eldono:

D/2019/2924/2

Flandra Esperanto-Ligo

Lange Beeldekensstraat 169 - 2060

Antwerpen

www.retbutiko.be

© 2019 FEL, Antverpeno

Tiu ĉi ekzemplero de *La fotoalbumo fermiĝas* enhavas nur parton de la verko. Ĝi rajtas esti libere kopiata.

La serio „Stafeto”



En la serio „Stafeto” aperis:

1. Ĉu rakonti novele? (Johán Valano)
(bindita versio elĉerpita, ankoraŭ havebla kiel bitlibro)
2. Sub la signo de socia muzo (William Auld kaj Stefan Maul, red.)
3. Kazinski venas tro malfrue (Deck Dorval)
4. Beletro, sed ne el katedro (Gaston Waringhien)
5. Murdo en Esperantujo (Daniel Moirand) *(bindita versio elĉerpita,*

- ankoraŭ havebla kiel bitlibro)*
6. Vojaĝoj finiĝas, amantoj kuniĝas (Manjo Austin)
 7. Nigra magio (Deck Dorval kaj Christian Declerck)
 8. Dirdri kaj la filoj de Usnaĥ (Adriaan Roland Holst)
 9. Oktavia (Seneko)
 10. Kromosomoj (Lorjak) („*Baza verkisto*”)
 11. 1887 kaj la sekvo (Gaston Waringhien)
 12. Dolĉe amare (Emile Van Damme)
 13. Urd Hadda murdita! (Deck Dorval)
 14. Meznokto metropola (Krys Ungar) („*Baza libro*”)
 15. Ŝirpecoj (Christian Declerck)
 16. Vojaĝoj kaj aliaj poemoj (Edwin de Kock) („*Baza verkisto*”)
 17. Kanto pri minotaŭro (Gerrit Berveling)
 18. Plena poemaro (Eŭgeno Miĥalski) („*Baza libro*”)
 19. El sisma zono (Mikaelo Giŝpling) („*Baza libro*”)
 20. Tri rakontoj pri la Miljara Paco

- (John Francis) (*„Baza verkisto”*)
21. Sur Parnaso (Timothy Brian Carr)
 22. Konto de l' vivo (Paul Gubbins)
 23. La ŝtona urbo (Anna Löwenstein)
 24. Kapturnoj (Higinio García)
 25. Simptomoj (Gonçalo Neves)
 26. La Bato (Lena Karpunina)
 27. Sagao de Njal (Nekonata aŭtoro; tradukis Baldur Ragnarsson) (*„Elstara verko”*)
 28. Tie, ĉi tie (Mikaelo Giŝpling) (*„Baza verkisto”*)
 29. Dormanta Hejmaro (Manashi Dasgupta; el la bengala tradukis Probal Dasgupto)
 30. Bildoj pri norda lando kaj aliaj rakontoj (Sen Rodin)
 31. Neokazinta amo (Lena Karpunina)
 32. Sub fremdaj ĉieloj (Edwin de Kock)
 33. Morto de artisto (Anna Löwenstein)
 34. Kvazaŭ ĉio dependus de mi (Trevor Steele)
 35. Flugi kun kakatuoj (Trevor Steele)
 36. Paradizo stelita (Trevor Steele)
 37. Konvinka kamuflaĵo (Trevor Steele)
 38. Dio ne havas eklezion (Trevor

Steele)

39. Amo inter ruinoj (Trevor Steele)

40. La fotoalbumo fermiĝas (Trevor Steele)

41. La konflikto de la epokoj (Edwin de Kock) („*Baza verkisto*”)

Notoj

- *Baza libro*: baza, nepre leginda kaj legenda libro (laŭ William Auld).
- *Baza verkisto*: aŭtoro aparte rekomendita de William Auld.
- *Elstara verko*: verko kiu apartenas laŭ la Nobel-komitato al la 100 plej bonaj iam verkitaj.